



Omaĝo al la 37-a Datreveno de KEA en Santiago de Cuba

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

La 18-an de junio, la Provinca Filio Santiago de Cuba omaĝis la 37-an Datrevenon de KEA per aranĝo en la urba biblioteko Elvira Cape, kiu plurfoje kaj diversflanke bonvenigis Esperanton: prelegoj, komitatkunsidoj, ekspozicioj, kursfinaj aranĝoj, ktp.

Trideko da lokaj esperantistoj kaj gastoj ĝuis la diversajn programerojn de la aranĝo, bone organizita kaj kunordigita de la tiea Ĝenerala Sekretario Gonzalo Collantes. Inter aliaj aferoj, menciendas prezento de la muzikensemblo Amindaj kaj ties alternativa Teamo Bachata, el ContraMaestre, kiuj regalis nin per pluraj kantoj en Esperanto.

Grava momento ankaŭ, estis la prezento de la prelego “Pintaj momentoj de Esperanto en Kubo (1904-2016)”, flanke de Juan Ramón Rodríguez, estrarano kaj historiisto de KEA, kiu krome transdonis atestilojn al kvar lokaj esperantistoj atingintaj 25 jarojn en la movado (Gonzalo Collantes García, Francés Guibert Sorzano, Miosotis Planas Fajardo kaj Julio César Tamayo Salas) kaj al du aliaj kiuj jam fariĝis 20-jaraj membroj de KEA (Graciela Morgado Rodríguez kaj Guillermo Navarro Toledano).

Speciala momento estis la legado de mesaĝo sendita de la KEA-prezidanto al la membraro de tiu filio, kie li resumis elstarajn momentojn de Esperanto surloke, en la lasta epoko, kiel la okazigo de du komitatkunsidoj (1993 kaj 2000) kaj la 3-a Kuba Kultura E-Festivalo (1998), al kio aldonendas, ke tiu urbo estis pioniro de nia lingvo en la lando, ĉar tie fondiĝis la unua oficiala E-grupo (Catalanes Esperantistas de Cuba, 1907), la unua tutlanda asocio (Kuba Esperanta Societo, 1908) kaj la unua gazeto (*Kuba Stelo*, 1909), kaj unuafoje en Kubo oni kantis kanzonon en la zamenhofa lingvo (“Amu al mi multe”), la 6-an de junio 1954.

Ĉeestis la aranĝon d-rino Olga Portuondo, historiisto de la urbo Santiago de Cuba; Laura Zúñiga, en reprezento de la Provinca Direkcio de Kulturo; kaj Aurora Ojeda, direktorino de la Provinca Biblioteko Elvira Cape, kiu ricevis tri ekzemplerojn de la verko *El Esperanto en Cuba (1904-1973)*, hispanlingve verkita de la asocia historiisto.



Supre, Juan Ramón Rodríguez Gómez prezentas la prelegon “Pintaj momentoj de Esperanto en Kubo (1904-2016)”. Malsupre, koncertas Teamo Baĉato, el ContraMaestre. Fotoj: Ernesto Jústiz.

Kelkaj eroj el nia historio

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Okaze de la 37-a Datreveno de KEA, ni kompilis erojn de nia historio, tuj antaŭ la fondo. Ni memoru niajn antaŭulojn kaj kunpensu niajn taskojn por plenumi la celon, nome, disvastigi kaj instrui Esperanton en Kubo.

Fine de la 60-aj jaroj, ĉe la Ministerio pri Edukado (MINED), aktivis Komisiono por Esperanto, kiu entreprenis precipe kompilon de informoj pri la Internacia Lingvo kaj iamaniere propagandis la aferon ĝis 1971. Tiam en la ĉefurbo ariĝis kelkaj memlernintoj, kiuj komencis instrui la lingvon al interesitoj kaj en oktobro kunfondis Havanan Esperanto-Grupon, kiu en 1972 iĝis Havana Esperanto-Rondo (HER). Dum tiujara vizito de d-ro Paul Neergaard (Danio, 1907.02.19–1987.11.13) al Kubo, HER organizis kelkajn aranĝojn kaj ebligis lian renkontiĝon kun funkciuloj de MINED al kiuj li trafe informis pri E-instruado en aliaj landoj.

Rezulte de la aktiva laboro de HER, la 17-an de aŭgusto 1974, fondiĝis en Havano – sen jura oficialiĝo – Kuba Esperanto-Asocio, kio reprezentas komenciĝon de nova etapo, ĉefe de propagando kaj demarŝoj por la oficialigo de KEA kaj por plimultigo de internaciaj rilatoj.

En oktobro 1977, okaze de vizito al Havano, elstara vjetnama esperantisto kaj mem diplomato, prezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, s-ro Nguyen Van Kinh (1916–1981), esprimis al la aŭtoritatoj sian deziron kunsidi kun kubaj esperantistoj. La renkontiĝo okazis en la sidejo de Kuba Porpaca Movado kaj revigligis la movadan aktivadon.

Kadre de la 11-a Monda Festivalo de Junularo kaj Studentoj okazinta en Havano julie de 1978, kelkaj esperantistoj el okcidenteŭropaj landoj kaj havanaj esperantistoj organizis modestan aranĝon, kie la IL ludis sian rolon. Post okazigo de baza kurso, kie sukcese lernis la lingvon pluraj centoj da personoj, oficiale fondiĝis la nuna Kuba Esperanto-Asocio (KEA), la 16-an de junio 1979.

La 3-an de januaro 1983 oni malfermis Centran Oficejon de la Asocio (str. Neptuno kaj Industria, Centra Havano), kiu iom post iom fariĝis renkontiĝejo por aktivuloj, estraranoj kaj movadanoj. Meze de 1986, dum la 2-a Internacia Librofoiro de Havano, okazis Esperanta Teknika Konferenco en la Kongresa Palaco, kun la ĉeesto de s-ro Simo Milojević, tiama Ĝenerala Direktoro de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La 4-an, 5-an kaj 6-an de decembro 1987 oni efektivigis la Unuan Tutlandan Kongreson de KEA en nia ĉefurbo, kiun partoprenis 600 kubaj geesperantistoj kaj gastoj el Nederlando, Hungario kaj Bulgario. Sekvis aliaj internaciaj eventoj, Iberamerika Konferenco en 1988, Kultura Festivalo en Santiago de Cuba, la 75-a UK en 1990, la 6-a Tutamerika Kongreso en 2004, la 95-a UK en 2010, ekde 2011 Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERO), la 6-a Kongreso de KEA en 2015, seminarioj, trejnadaj ktp.

La 16-an de junio ĉiam estas oportuna momento por festi kaj ankaŭ cerbumi pri nia respondeco daŭre flegi nian organizaĵon kiu naskiĝis danke al konstanta kaj firma agado de la pioniroj. Kiel plifortigi nian movadon, kreski nombre kaj kvalite? Jen defio por ĉiu membro, aktivulo kaj gvidanto. Ek al venko!

Fonto: RODRÍGUEZ GÓMEZ, Juan Ramón: “La poresperanta agado en Kubo (1904-2004)”, en: *Kongresa Libro de la 6-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto*, Komisiono pri Historio, Kuba Esperanto-Asocio, Havano, 2004.

KOMUNUME

Diplomlaboro pri Esperanto en la Universitato de Havano

La 16-an de junio en la Fakultato pri Komunikado de la Universitato de Havano, la juna esperantistino Ariadna García Gutiérrez sukcese defendis diplomlaboraĵon por ricevi sian titolon kiel licenciatino pri Informaj Sciencoj. La diplomlaboraĵo estas *Dezajno de Ontologio pri la Nacia Kongreso de Esperanto*.

Koincide kun la fondo-datreveno de KEA, tiu ĉi diplomlaboraĵo estas la unua prezentita en Kubo dum la lastaj 88 jaroj, kiam en la sama Universitato, la poldevena studento s-ro Elias Johns (originale Jonovski) prezentis, la 14-an de majo 1928, doktorigan disertaĵon titolitan “La problemo de internacia helplingvo kaj ties solvo: Esperanto”, kiu ankaŭ aperis libroforme.

Kiel kleriĝi pri scienco?

Ofte ni legas aŭ aŭskultas pri la bezono ke la esperantistaro pli konscie agadu en la sciencokampo.

Tial ni venas al tiu ĉi demando per vortoj de d-ro Detlev Blanke, konata germana esperantisto, lingvisto kiu dum multaj jaroj laboras en tiu ĉi agadokampo, aparte pri interlingvistiko. Li starigas jenan demandon kaj mem respondas: Kiel kleriĝi kaj informiĝi pri la scienco?

Por kleriĝi pri interlingvistiko kaj esperantologio ne ekzistas tre idealaj kondiĉoj en la Esperanta lingvo-komunumo.

Naciaj kaj internaciaj konferencoj ĉi-temaj maloftas. Maloftas konvenaj programeroj kadre de naciaj kaj internaciaj aranĝoj. En universitatoj oni foje ofertas pli malpli simplajn E-kursojn, sed ege malofte prelegseriojn pri la disciplinoj interlingvistiko kaj esperantologio.

Estas simptome, ke dum pli ol 40 jaroj ne niu alia universitato sekvis la ekzemplon de Budapeŝto, kie eblas akiri instruistan diplomon por Esperanto.

Oni tamen povas observi kreskon de la kvanto de universitataj tezoj (aparte diplomaj kaj magistrigaj, sed ankaŭ doktorigaj) aparte meze de la 1970-aj jaroj.

Laŭdindas la internaciaj postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj, iniciato de d-rino Iлона Koutny, de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando).

Lastatempe kreiĝis ebloj por subteni seriozajn studojn ankaŭ finance: Esperantic Studies Foundation (www.esperantic.org) estas unu el ili.

Do, ni volas per tiu ĉi temo instigi niajn sciencistojn aŭ interesatojn pri tiu ĉi laborkampo. Estas ja bezonata ĉies kontribuo al scienc evoluigo per Esperanto.



Kuba Esperanto-Renkontiĝo 2017

Kampadejo Dos Hermanas

Viñales, Pinar del Río

14-19 marto 2017



Isidro Fardales, direktoro de Radio Havano Kubo, akceptas la gratulan atestilon de Kuba Esperanto-Asocio okaze de la 55-a Fondo-datreveno de tiu radiostacio, kiu ekelsendis en Esperanto en 1988. Foto: Maritza Gutiérrez González.

Esperanto en Radio Havano Kubo

La 1-an de majo Radio Havano festis sian 55-an fondodatrevenon. Por la okazo estis organizitaj diversaj aranĝoj kaj ceremonioj kiuj reliefigis la rolon de la internacia radiostacio kiel kuba voĉo amika, kiu trairas la mondon informante pri ĉiuj aspektoj de la vivo en la kariba insulo.

Ĝuste tial ni, la skipo de la Esperanto-redakcio kaj KEA-estraranoj partoprenis la ceremonion okazintan en la sidejo de la Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj (ACNU), kie pluraj teamoj el la diversaj lingvoj de la radiostacio, dediĉis apartan momenton por rekonni kaj danki al la tuta stabo de Radio Havano Kubo.

Ankaŭ KEA profitis la okazon por transdoni rekonan atestilon pro la utiligo de Esperanto kiel laborlingvo ekde la jaro 1988. Kanto en Esperanto de la juna duopo formita de Jany Quiñones kaj Geomar Martínez, estis bela regalo por la elstara publiko inter kiuj diplomatoj el diversaj landoj, iamaj kubaj diplomatoj, membroj de aliaj asocioj kiel la kariba, la araba, amikoj de Radio Havano kaj ĵurnalistoj. Sendube ĝi estis bela momento kiu montris kiom gravas la laboro plurlingva de la kuba radiostacio.

Pontolingvo okaze de naturaj katastrofoj

En la marta numero de la revuo *Esperanto* aperas interesa artikolo verkita de Christoph Klawe kies titolo estas “Por la elito de la internacia Medicinistaro”. La aŭtoro parolas pri tio ke aktuala projekto estas insti-

go uzi Esperanton kiel pontolingvon por skipoj, kiuj helpas okaze de naturaj katastrofoj: Sukuristoj Reagas Per Esperanto, tio estas, (SUPER).

Estas unu el la celoj de SUPER prepari intensan E-Kurson speciale por medicinistoj, kiuj partoprenas internaciajn helpoprojektojn okaze de katastrofoj, disponigi la saman kurson aŭ samnivelan trejnadon al respondeculoj surloke por kapabligi ilin al samrajta komunikado, kiam bezonata, kaj prefere science pruvi, ke la metodo kaj ĝia uzado praktike taŭgas.

Por realigi la SUPER-projekton, Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) jam havas du partnerojn, nome Internacian Ligon de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Internacian Esperanto-Instituton (IEI) en Hago, Nederlando. UMEA esperas realigi SUPER ekzemple kadre de la novfondita “European Medical Corps”, rezulto de kunlaboro de multaj eŭropaj ŝtatoj por prepari rapidan reason al epidemioj aŭ aliaj internaciaj sankrizoj.

El la supraj informoj oni facile vidas, ke Esperanto indas havi lokon en la Internacia medicina kunlaboro, kie multaj lingvaj baroj ekzistas kaj speciale medicinistoj, kiuj ne flue regas la anglan, ne havas bonan eblon komuniki siajn, ofte gravajn, observojn kaj esplorojn.

Ni estu realismaj: ne verŝajnas, ke Esperanto iam estonte iĝos la ununura aŭ ĉefa lingvo de la internacia medicina agado, sed ĝi tute ne devas. Ni vivas en tempo, kiam komputilaj produktoj kiel la tradukbastoneto

“Ili” de la firmao Logbar (www.logbar.jp), komencas teknike transsalti lingvajn barojn. Tiaj teknikaĵoj certe sukcesos post paso de sufiĉa tempo kaj fariĝos uzablaj en ĉiutagaj situacioj. En tiuj estontaj tempoj, pontolingvoj tamen estos bezonataj, kiam teknikaĵoj ne funkcios. Sed eĉ la plej ruzaj teknikaj komunikiloj neniam sukcesos anstataŭigi la “internan ideon” de Esperanto, kiu helpas kompreni nin kiel mondan homan komunumon.

Esence Esperanto jam helpas kaj ĉiam helpos krei la necesan sintenon de la progresema elito de la internacia medicinistaro, ke estas ilia tasko kune solvi sanproblemojn ĉie tra la mondo, ĉar en la erao de tutmondiĝo problemoj en unu parto de nia planedo senpere gravas por ĉiuj; kaj ke estas komuna tasko de la medicinistoj ie ajn en la mondo rompi la katenojn de malsano por liberigi la pacientojn al la eblo forte labori por la progreso de la homaro.

Radio-Televido en Esperanto

La retejo Studio ĉe <http://novajhoj.weebly.com/>, kiu sin difinas kiel Radio-Televido en Esperanto fakte estas la plej kompleta retejo pri diversaj agadoj tra Esperantujo. En la rubriko “Kiuj ni estas” oni povas legi la jenon: “STUDIO estas grandskala kunlaborado inter multaj esperantistoj tra la mondo.

Ni devas aldoni ke la esperantlingvaj elsendoj de Radio Havano ankaŭ estas aŭdeblaj ĉe Studio, kio kompreneble nin ĝojigas kaj pro tio ni dankas al la teamo de Studio.

La Redakcio.

Kiel promesite, jen solvo al la krucvortenigmo publikigita en nia lasta numero. Ni lotumos libropremion inter la sendintoj de la ĝusta solvo. La redakcio.

| | | | | | | | | | | | | | | |
|----|---|----|----|---|---|---|---|----|---|---|---|---|---|---|
| 1 | Z | 2 | E | N | 3 | I | T | 4 | O | 2 | O | D | 5 | O |
| 3 | A | R | Ĝ | E | N | T | O | | | | | | V | |
| 4 | M | U | | | | | | 5 | A | G | A | C | O | |
| 6 | E | D | 6 | I | T | 7 | O | R | O | | | | | |
| 7 | N | I | N | | | 8 | N | I | T | R | A | | | |
| | H | C | D | | | 9 | G | O | L | O | | | 8 | M |
| | O | I | E | | | | | 10 | O | R | L | O | | |
| 11 | F | O | K | S | E | N | O | | | | | | L | |
| | | | 12 | S | A | T | E | L | 9 | I | T | O | | |
| | | | | | | | | | | | | | | |
| | | 13 | K | O | L | O | S | E | O | | | | | |

INFORMILO N-ro 2 DE LA NACIA SIDEJO (ĝis 2016-06-31)

Membroj-Subtenantoj 2016

Havano (23): Ángela María Pedrosa Cuesta, Onoermis Acuña Velázquez, Alberto Rodríguez Pineda, Noel González Fernández, Luis Enrique Rizo García, Oscar Asensio Pisciotta, Yordán Fonseca Olivera, Marta Eugenia Alonso Gutiérrez, Ismary Lezcano García, Digna Mayra Morales Burón, Alberto Fernández-Calienes Barrios, Javier Ramos Nistal, Olga Lidia Barrios Cunningham, María Antonia Cartaya Martínez, José Luis Hernández Carvajal, Miguel Ángel González Alfonso, Daimi Doval Delsa, José Cárdenas Zúñiga, Juan Carlos Montero Medina, Vilhelmo Lutermano, Julián Hernández Angulo, Magaly Valdés Serrú, Elmer Lores Matos. **Mayabeque (1):** Yuniór

Benítez Alonso. **Sancti Spíritus (1):** Yoandra Rodríguez Labrada. **Guantánamo (5):** Leonardo Luna Neyra, Tania Laurencio Molina, Tirso Ávila Bory, Asiel Torres Laurencio, Iliagne Torres Jardines.

Donacoj

Martí-Klubo: Vilhelmo Lutermano (CUC 20.00); **Kuba Esperantista Junulara Organizo:** Vilhelmo Lutermano (CUC 16.00); **Fonduso Instruado:** Ángela María Pedrosa Cuesta (CUP 100.00), Alberto Fernández-Calienes Barrios (CUC 2.00), Diana González Padilla (CUC 3.00), Alberto Rodríguez Pineda (CUC 10.00). **Ĝenerala Kaso:** Yuniór Benítez Alonso (CUP 25.00).
Al ĉiuj KEA tre kore dankas.

Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
info@esperanto.co.cu
www.esperanto.cu/it.cu



#AKTIVADO
VROCLAVO 2016

72-A INTERNACIA JUNULARA
KONGRESO DE TEJO



101-a Universala Kongreso de
ESPERANTO
23.-30.07.2016 Nitro, Slovakio

Gratulon
en la
55-a Datreveno!

www.radiohc.cu/eo



RADIO HAVANO KUBO

Kurtondaj kaj retaj elsendoj en Esperanto

Nun ankaŭ en 102,5 FM!